

Bulgara **ESPERANTISTO**

V-49479/41

(1972)



E N H A V O

Nikola Aleksiev. Georgi Dimitrov pri la paco kaj la amikeco inter la popoloj	1
Hilda Dresen. Pino. Eĉ se griza la ĉielo. Ne cedu	3
Peter Jakobson. Morto de estona soldato en Bulgario. Tradukis Hilda Dresen	3
Akad. Ĥristo Ĥristov, N. Aleksiev. Konata fizikisto kaj pabatalanto	4
* * * Grava interkonsento pri kunlaboro inter turistoj kaj esperantistoj	5
* * * Projekto de regularo de SELEB	6
Ĥristo Manolov. Nova torĉo	6
Albatrano, F. Miĥajlova. Zamenhof-celebroj	7
J. Puodziunas. Celebro de Zamenhof en Kaunas	7
B. Beleva, J. Markov, M. Rajĉeva, D. Dimov, Tr. Trendafilov, Albatrano, At. Gaev. Niaj jarkunvenoj	7—9
Georgi Markov. Tra Mez-Eŭropo per Esperanto	9
Rajna Arnaudova. En la Valo de la Rozoj	9
Atanas D. Atanasov. Renkontiĝo kun veterano	10
Nikola Aleksiev. La batalema kultursocieto en proleta „Konjovica“	11
K. Vâlev. „Horizonto de Soveta Litovio“	13
J. Baliena. Balta Esperanta Tendaro	14
V. Ŝilas. Epizodoj el la 5-a	14
A. Kajenaite. Ĉe vasta Dnipro	15
St. Sobanska. Renkontiĝo de polaj kaj sovetaj esperantistoj	15
* * * Dudekjara datreveno de CED	16
* * * Nova principa venko en UNESKO	16
* * * SEMED 71 — impona seminario en Mediteranea regiono	16
Nikola Nikolov. Kiu inventis Esperanton	III
* * * Koncize	III
Ljudmila Jevsejeva. Erinaco. Malkontenta kato	III
* * * Humuraĵoj. Tradukis: D. Cibulevskij	III
Romano Grinŝpan. Novaj proverboj	III
Deziras korepondi	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Esperantistoj el Sofio, Velingrad, Pazarĝik, Plovdiv ekskurse al la belega ĉirkaŭaĵo de Velingrad, kie ĉiujare en junio okazas pilgrimo al la pereolokoj de la esperantistoj-partizanoj Vela Peeva kaj Stoju Kalpazanov

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 4,28 lv., 2 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, USSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 2 lv. Por Italio — 2000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“ (Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukaresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika, D. 7, kor. 3, kv. 44, V 117 449 Moskva V—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



GEORGI DIMITROV PRI LA PACO KAJ LA AMIKECO INTER LA POPOLOJ

Por ni, esperantistoj, la problemo pri konservo de la paco kaj firmigo de la amikeco kaj la reciproka kompreniĝo inter popoloj kaj ŝtatoj kun malsama sociordo estas problemo de unuagrada signifo. Ĉiu malobservo de la pacaj rilatoj inter la ŝtatoj, ĉiu intensigo de la ŝovinismo, rasismo, imperiismo kaj faŝismo malordigas pli-malpli grade la normalan evoluon de la Esperanto-movado kiel tipa internacia movado. Tial la esperantistoj principe estas sinceraj adeptoj de paco kaj amikeco inter la popoloj, kvankam ne ĉiam kaj ne ĉiuj el ili staras sur ĝustaj kaj aktivaj pozicioj pri la problemoj de konservo de la paco en la mondo, eĉ iam ili lasas sin infekti per ŝovinismaj kaj rasismaj konceptoj.

En la batalo de l'esperantistoj flaskigi la planojn de la instigantoj de militkonfliktoj inter la popoloj, samkiel por korekta batalo kontraŭ la manifestiĝoj de ŝovinismo, rasismo kaj imperiisma agreso kontraŭ la libero kaj la nacia sendependeco de la popoloj, oni povas ricevi grandan helpon el la idea heredaĵo kaj persona ekzemplo de la eminenta filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov. Kiel socipolitika aganto de marksisma-leninisma tipo, kiel batalanto por la libero de la bulgara kaj multaj aliaj popoloj, kiel organizanto kaj ideologo de la batalo kontraŭ la faŝismo en la mondo, kiel fondinto de la nova bulgara ŝtato post la venko de la socialisma revolucio je la 9. IX. 1944, kiel ŝtatestro kaj homo Georgi Dimitrov estas modelo por ĉiuj sinceraj patriotoj kaj internaciistoj, konsekvencaj batalantoj por paco kaj amikeco inter la popoloj, por reciproke akceptindaj solvoj de la internaciaj disputproblemoj per traktado kaj ne per militoj.

Nun, kiam ni staras antaŭ la 90-a datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov (1882—1972), estas utile rememorigi liajn komprenojn, ekskluzive gravajn por ĉiuj popoloj kaj ankaŭ por ni, esperantistoj.

Kiam en la komenco de la tridekaj jaroj Hitlera Germanio sin preparadis por komenci novan, duan mondmiliton, la ŝtatestroj de Anglio, Francio kaj Usono ne organizis kune kun la aliaj popoloj kontraŭstaron al la faŝismaj militbruligantoj. Io pli: ili kuraĝigis ilin en ilia krima intenco, strebante per ĉiuj fortoj direkti la baton de faŝisma Germanio al Oriento, kontraŭ Sovetunio.

Sed kiam Hitler trompis iliajn esperojn kaj antaŭ ol direkti kontraŭ Sovetunio, frakasis Francion kaj aliajn eŭropajn ŝtatojn kaj metis en malfacilan staton Anglion mem, apenaŭ tiam la registaroj de tiuj landoj konsentis pri fondo de kontraŭhitlerisma koalicio, kies vertebraro kaj ĉefa forto estis Sovetunio.

En tiu malkvieta tempo de febra preparado al agreso Georgi Dimitrov serĉis manierojn kaj eblojn konservi la estonton de la homaro kontraŭ la faŝisma pesto. Antaŭ ĉio li apelaciis al la laboristaj organizaĵoj kun diversa idea direktiĝo kaj organiza aparteno unuigi sin por komuna batalo kontraŭ la pendanta minaco. Dimitrov proponis, ke oni iniciatu unuecan laboristan politikon kontraŭ la preparo de nova milito, por konservo de la paco. Certajn sukcesojn tiudirekte oni atingis, sed ili ne estis sufiĉaj haltigi la ofensivon de la faŝismo kaj la milito.

Kiam la milito ekhavis liberigan kontraŭfaŝisman karakteron, Georgi Dimitrov laboris plej energie por kunigo de ĉiuj kontraŭfaŝismaj fortoj, antaŭ ĉio de la laborista klaso el la kontraŭhitlerisma koalicio — por plena venko super la faŝismo, por paco, demokratio kaj libero.

Kiam per kolosaj viktimoj kaj suferoj, antaŭ ĉio de la soveta popolo, la venko estis elmilitita, Dimitrov insistis, ke oni konservu la kontraŭhitlerisman koalicion por establigo de daŭra paco en la mondo. Li apelaciis al la popoloj en ĉiuj landoj krei tian potencon pacmovadon, kiu malebligu aktivecon de la militinstigantoj, paralizu iliajn krimajn manojn kaj respektigu ilin. Li instruis, ke oni devas efektiviĝi realan internacian solidarecon sendepende de partia, religia kaj filozofia aparteno. Dimitrov entuziasmiĝis pri la ideo de vera frateco inter la popoloj.

Georgi Dimitrov batalis ankaŭ kontraŭ tiuj, kiuj perfidis la principojn de la kontraŭhitlerisma koalicio kaj kiuj komencis prediki „malvarman militon“ kontraŭ la popoloj konstruantaj la fundamentojn de nova, socialisma sociordo. En la „malvarma“ milito li prave vidis psikologian preparon de nova, tria mondmilito. Tial li apelaciis al la registaroj de la pacamaj landoj, al laboristoj, vilaĝanoj, intelektularo, patriotoj el la armeo ktp krei potencon popolan fronton por konservo de la paco, amikeco kaj kompreniĝo inter la popoloj kontraŭ nova militfaŝisma agreso.

Kiel ministro-prezidanto de Popola Respubliko Bulgario li gvidis klarvidan kaj saĝan politikon de bonnajbaraj rilatoj, de paco kaj amikeco. Li faris kontraktojn por kunlaboro kaj amikeco kun Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, Rumanio, Hungario, Pollando kaj aliaj landoj. Dimitrov sincere penadis, ke la Balkana Duoninsulo transformiĝu el pulvotenejo de Eŭropo en stabilan fortikajon de la paco en tiu terangulo.

La batalo por unuigo de la balkanaj popoloj, por fortikigo de la pacaj fortoj en Eŭropo kaj la mondo plu entuziasmigis la gvidantojn de Bulgario. Ili faras ĉion eblan por praktike realigi la testamentojn de Georgi Dimitrov por paco kaj amikeco inter la popoloj. La tuta bulgara popolo unuanime kaj plene subtenas tiun ĉi pacaman politikon.

Ankaŭ ni, bulgaraj esperantistoj, ekstaras unuanime sur la pozicioj de la granda humanisto kaj pacbatalanto, patrioto kaj internaciisto Georgi Dimitrov. La justa afero, al kiu li dediĉis ĉiujn siajn fortojn, venkos! La manoj de l'usonaj agresantoj kaj ties helpantoj estos paralizitaj, kiel konsilis Georgi Dimitrov, por ke triumfu la paco, libereco, nacia sendependeco kaj amikeco inter la popoloj de ĉiuj anguloj de nia antikva kaj juna planedo!

Devo de ĉiu esperantisto estas ricevi nian asocian organon „Bulgara Esperantisto“. Se via amiko aŭ konato ankoraŭ ne abonis ĝin, instigu lin fari tion tuj pene de la asocia kancelario!



Lige kun la 75-jara datreveno de la poetino

Hilda Dresen

PINO

Forta vento blovas de la nordo,
ŝtorme vipas nokte kaj dum tag'
pinon, kiu staras sur marbordo —
ĝin mi ofte vidas en imag'.

Ĝi ne estas svelta pin' arbara,
rekte sin streĉanta al ĉiel',
tiu ĉi pinarbo apudmara
al hero' similas en fabel'.

Branĉobrakojn fortajn, muskolozajn
ĝi etendas larĝe super ter',
kaj la ventatakojn furiozajn
spitas ĝi reziste kun fier'.

Bone, se kelkfoje hor' trankvila
venas pro kolekto de la fort'
al denova lukto malfacila,
al batal' daŭranta ĝis la mort'.

ĈE SE GRIZA LA ĈIELO. . .

Eĉ se griza la ĉielo
super kotkovrita tero,
portu en la kor' lazuron,
fuĝos grizo kaj deprimio,
kaj vi havos en animo
ĝojburĝonojn, vivplezuron,
sunsubiran orpurpuron.

NE CEDU

Se la sufer' multvizaĝe grimacas,
la malespero vin kapti minacas,
restu en stato atenda, ne cedu,
certe troviĝos eliro, nur kredu!
Eble penseto savanta subite,
kvazaŭ hazarde kaj neatendite,
en la anim' turmentita ekĝermos,
la malesperon radike ekstermos.
Kredu: nenio ja daŭras eterne,
sangas kaj floras la koro alterne.

*Via agado pere de Esperanto estas va-
lora. Vi devas daŭrigi tiun ĉi agadon.*

Georgi Dimitrov

MORTO DE ESTONA SOLDATO EN BULGARIO

de Peeter Jakobson (1854—1899)*

Jam kelkajn horojn daŭras la batalo,
kaj centoj morte kuŝas sur la ter',
kuraĝe paŝas la militistaro —
ĉu mort' aŭ venko estas ĉies cel'.

Aero tremas, teron bomboj skuas,
la sunon dense kovris fumnebul',
trumpetoj kaj tamburoj forte bruas,
entuziasmon donas al bravul'.

Sur freŝa herb' en kverka arbareto
soldat' estona luktas kun la mort',
en lia koro regas malkvieto,
salutojn lastajn sendas li al nord'.

Subite preterpaŝe lin aliras
fidela kaj fidinda kamarad',
li helpi kaj konsoli lin deziras,
de l' frunt' ekviŝas ŝviton kun kompat'.

„Amiko, estas bone, ke la sorto
al vi en lasta horo gvidis min.
Amiko, por patruj' vin prenas morto,
sed al sufer' ja baldaŭ estos fin!“

Kaj volas la mortanto lastafoje
ekpremi manon karan de l'amik',
rezigni tamen devas li malĝoje,
sentigās en la brusto akra pik'.

„Mi mortas nun, sed donu la ĉielo,
ke liberigu tiuj montoj kaj popol',
jam morgaŭ al mi mankos suna helo,
sed vi batalu ĝis la venkohor'.

Ho, Estonio sur la norda bordo,
hejmanoj tie restis, amatin',
patrin' min tie ŝirmis kontraŭ sorto, —
salutojn mi transdoni petas vin!“

Kaj kiam tiujn vortojn li findiris,
tuj sekvis lia lasta korobat',
li vivofajron el la brust' elspiris,
en plena paco mortis la soldat'.

Da tero tri manplenojn sur lin ŝutis
a bona kamarad' per sia man':
„Vi por ripoz' eterna nun ekmutis,
mi eble sekvos vin hodiaŭ jam.“

El la estona: Hilda Dresen

* P. Jakobson mem partoprenis la Liberigan
Militon kontraŭ la turka jugo.



La bulgara akademiano prof. Georgi Naĝakov estas konata fizikisto kaj senlaca pacbatalanto. Li ĵus festis sian 75-an jubileon, gratulita kiel de la scienca mondo, tiel ankaŭ de la



pacbatalantoj kaj aliaj reprezentantoj de sociaj kaj kulturaj organizaĵoj.

Akad. Naĝakov daŭre laboras energie kaj entuziasme.

Naskita en la fino de 1896, li absolvis kun brila sukceso la gimnazion kaj poste la Universitaton de Sofio en la fako de fiziko kaj matematiko. En 1921 li fariĝis asistanto de eksperimenta fiziko ĉe la sama Universitato kaj jam duonjarcenton laboras kiel elstara fizikisto. Akad. Naĝakov plene dediĉis sian vivon al la scienco. Li specialiĝis en Parizo en 1926 ĉe la famaj francaj scienculoj Pol Lanĝeven (Paul Langevin) kaj Mari Kjuri (Marie Curi). De tiuj grandaj progresemaĵoj sciencistoj la talenta juna homo ne nur lernis kiamaniere labori sukcese en la sfero de la scienco, sed akceptis ankaŭ iliajn konceptojn — estimo al la sociaj problemoj kaj al la batalo por paco kaj progreso.

Baldaŭ li estis elektita docento, kaj en 1932 fariĝis profesoro.

En 1946 estis fondita la Instituto de Fiziko ĉe la Akademio de Sciencoj, kaj prof. Naĝakov estiĝis ĝia direktoro, kia li estas ankaŭ nun.

Tiel same li okupis la postenojn de rektoro de la Sofia Universitato.

Akad. G. Naĝakov estas aŭtoro de pli ol cent originalaj sciencaj verkoj pri la fiziko de dielektrikoj kaj de la duonkondukiloj kaj pri specialaj problemoj de la fajnaj pesadoj. Li kreis aparataron kun tre valoraj ecoj, malkovris interesajn fizikajn efektojn ĉe la dielektrikoj, fondis sciencan teorion, kiu estas larĝe menciata kaj disvolvata kiel ĉe ni, tiel ankaŭ eksterlande. Akad. Naĝakov prave estas konsiderata kiel fondinto de bulgara skolo de fiziko de la dielektrikoj kaj duonkondukiloj, havanta siajn sukcesojn, tradiciojn kaj dignajn reprezentantojn.

Multaj generacioj de fizikistoj, matematikistoj, kemiistoj, inĝenieroj k. a. studis fizikon en la aŭditorio de Naĝakov. Li estas aŭtoro de universitataj lernolibroj de fiziko.

La plej granda atingajo de akad. Naĝakov kiel sciencisto-organizanto estas sendube la kreo de Instituto de Fiziko kun Atoma Scienc-Eksperimenta Bazo ĉe la Akademio de Sciencoj kaj de Kosma Stacio sur la plej alta bulgara montopinto Musala (2925 m). Hodiaŭ en ili laboras pli ol sescent sciencaj kunlaborantoj.

Akad. Naĝakov estas tre aktiva sociaganto. Multajn jarojn li estis deputito en la Nacia Parlamento, vicprezidanto de la Komitato de Atoma Energio, prezidanto de la Akademio de Sciencoj, prezidanto de la Komisiono por Sciencaj Premioj je la nomo de Georgi Dimitrov, k. a.

Akad. Georgi Naĝakov estas eksterlanda membro de la Soveta Akade-



mio de Sciencoj, de l'Akademio en Göttingen, de la Usona Asocio por Evoluigo de la Scienco. Li estas distingita per diversaj altaj honortitoloj kaj ordenoj.

Multajn jarojn akad. Naĝakov laboris en la nacia kaj tutmonda pacmovado. Li longjare gvidis la Nacian Pacdefendan Komitaton kiel ĝia prezidanto, — nun ĝia honora prezidanto, estis membro de la Tutmonda Packonsilantaro, ankaŭ de la tiel nomata „Paguŝa Movado de Sciencistoj“, kiun partoprenas elstaraj sciencistoj el multaj landoj. Li estis dekoraciita per ora medalo de la Tutmonda Packonsilantaro kaj ankaŭ de la Soveta Packomitato.

Akad. Naĝakov tre ŝatas la agadon de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Li sisteme subvenciis el la

kasoj de la Nacia Pacdefenda Komitato la eldonadon de bulgaraj numeroj de „Paco“, faris specialan prelegon en Esperanto antaŭ la partoprenintoj de la Tria Konferenco de MEM en Sofio (1963), subskribis la peticion de UEA al la Nobel-Komitato por prijuĝo de pacpremio al la esperantista movado, kontribuis per artikoloj pri pactemoj en numeroj de „Paco“, eldonitaj en Bulgario, ktp.

Ni elkore gratulas lin okaze de lia 75-a jubileo kaj deziras al li ankoraŭ longajn jarojn de aktiva scienca, socia kaj speciale porpaca agado!

*Akad. Hristo Hristov,
Nikola Aleksiev,
prezidanto de MEM, membro de la Tutmonda Packonsilantaro*

GRAVA INTERKONSENTO PRI KUNLABORO INTER TURISTOJ KAJ ESPERANTISTOJ

La 22-an de novembro 1971 en Sofio inter la Komitato de Turismo ĉe la Ministra Soveto, reprezentata de sia prezidanto k-do Petko Todorov*, kaj la Bulgara Esperantista Asocio, reprezentata de sia prezidanto Nikola Aleksiev, estis subskribita Protokolo por Kunlaboro.

Utiligante la entuziasmon de la esperantistoj, la Komitato de Turismo faros la neceson por aligi iliajn reprezentantojn al la komitatoj por helpado kaj disvolvo de la turismo en la distriktoj.

La Komitato de Turismo eldonos broŝurojn, gvidlibrojn k. a. en Esperanto. Ĝi atentigos siajn reprezentantojn en eksterlando serĉi kunlaboron de esperantistoj kaj ties organizaĵoj.

Ĉe gazetaraj konferencoj kaj renkontiĝoj kun eksterlandaj ĵurnalistoj oni invitos ankaŭ reprezentantojn de la Esperanto-gazetaro.

Siaflanke la Bulgara Esperantista Asocio devigas sin fondi ĉe si grupon, kiu specialiĝu pri la problemoj de l'internacia turismo.

BEA rekomendos al la E-societoj instigi siajn membrojn en siaj korespondadoj popularigi gravajn eventojn, turistajn objektojn, festojn, kulturajn kaj aliajn manifestiĝojn. Specialan atenton oni turnu al la Festo de la Rozoj, la Ora Orfeo kaj la Somero de Varna.

Ĝenerale la esperantistoj uzu diversajn manierojn kaj formojn por veki intereson eksterlande pri nia patrujo kiel bona objekto de internacia turismo.

BEA pripensos la demandojn efektiviĝi ĉiujaran aranĝon (seminaron, ferion, ripozon k. a.) por bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj uzante la materialan bazon de la Komitato de Turismo.

Antaŭvidita estas ankaŭ eldonado de esperantlingva turisma bulteno, pri kiu zorgos ambaŭ institucioj.

Kiel videble, la interkonsentoj estas tre bonaj, kaj plejparte de ni, esperantistoj, dependas, ke ili ricevu karnon kaj sangon en la vivo. Do, armitaj per tiu ĉi grava oficiala dokumento — la Protokolo inter la Komitato de Turismo kaj BEA — ni eklaboru pli vigle kaj laŭplane ol ĝis nun sur la tiel fruktopromesa kampo — la enlanda kaj internacia turismo!

URĜA!

GRAVA!

Karaj Esperanto-instruistoj kaj kursgvidantoj! Tre efika rimedo por reteni en nia Movado la novajn esperantistojn estas la ricevadado de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“. Do, tuj abonigu ilin kaj la monon sendu al la asocia kancelario: bul. Hristo Botev 97, Sofio.

*Vidu la Intervjuon de k-do Petko Todorov kun reprezentanto de nia Redakcio en „Bulgara Esperantisto“ n-ro 1, paĝo 5, 1971.



Ĉe la Bulgara Esperantista Asocio stariĝis Provizora Komisiono, havanta la taskon organizi Sekcion de Esperantaj Literaturistoj en Bulgario.

La oficiala fondo de la Sekcio okazos en ĝenerala kunveno dum la 38-a Esperanto-Kongreso de BEA en Smoljan.

Verkemaj kaj tradukemaj esperantistoj bonvolu studi la projekton de la regularo kaj sendi sian opinion pri ĝi. Samtempe ili estas petitaj aliĝi al la fondota Sekcio.

Leterojn adresu al: **Sofio C, BEA, p. k. 66** (por Ljuba Bojaĝieva).

PROJEKTO DE REGULARO DE SELEB

Celoj kaj taskoj

1. Por instigi al laboro la verkemajn kaj tradukemajn esperantistojn, oni fondis Sekcion de Esperantaj Literaturistoj en Bulgario (SELEB) ĉe la Bulgara Esperantista Asocio.

En sia agado SELEB sin gvidas de la decidoj de 1^a estraro de Bulgara Esperantista Asocio kaj kree aplikas la ĝeneralan linion de Bulgara Komunista Partio rilate la socialisman realismon en la verkado kaj tradukado. Ĝi laboras en proksimaj rilatoj kun ĉiuj enlandaj kaj eksterlandaj organizaĵoj aŭ grupoj laborantaj surbaze de la realismaj pozicioj de verkado.

2. SELEB celas:

- perfektigon de siaj membroj kaj instigo al disvolvo de la originala kaj tradukata literaturo en Bulgario;
- starigon de pli proksimaj ligoj kun paren-

caj organizaĵoj en eksterlando kaj organizo de reciproka gastado de siaj membroj.

3. Por efektivigo de tiuj celoj SELEB

— organizas literaturajn legadojn ĉe naciaj kongresoj, festivaloj, ekskursoj, reciprokaj gastadoj kaj simile;

— pretigas fakulojn por tradukado, redaktado kaj verkado;

— propagandas la atingojn de la socialismo en Popola Respubliko Bulgario kaj de ĝia literaturo per eldonado de almanakoj, kolektoj k. s. kun verkoj kaj tradukoj de siaj membroj.

— instigas al kunlaborado al „Bulgara Esperantisto“, „Paco“, „Interligilo“, „Internacia Ĵurnalisto“ k. a. gazetoj;

— organizas konkursojn por originalaj verkoj kaj tradukoj;

— recenzas verkojn de siaj membroj.

Organizo

4. En la kadroj de la lokaj Esperanto-societoj formiĝas literaturaj rondoj tie, kie troviĝas almenaŭ 3 verkemuloj kaj tradukantoj.

5. La rondoj aliĝas al SELEB, de kies estraro ili ricevas metodikan gvidadon.

En lokoj, kie troviĝas malpli ol 3 verkemaj esperantistoj, ili aliĝas individue rekte al la Sekcio.

6. SELEB havas sian sidejon en Sofio. Ĝia laboro estas gvidata de Sekcia Komitato. La Komitaton oni elektas en ĝeneralaj sekciaj kunvenoj ĉe la kongresoj de BEA.

7. Tiu ĉi regularo estas provizora. En definitiva formo ĝi estos akceptita de fondkunveno de la Sekcio, okazonta en la proksima kongreso de BEA.

DE LA INICIATIVA KOMITATO

NOVA TORĈO

Vi haltas ĉe fervojstacio Polski Trâmbeŝ kaj vin renkontas, tra la vitro de murgazeto, la noblaj okuloj de Zamenhof. Vi prenas la lastan, novjaran numeron de la loka gazeto „Podem“, kaj via verdstelana koro pli vigle ekbatas: du materialoj pri nia kara Movado, salutleteroj el eksterlando. Vi ekstara sĵ apud la ĉambro de la teknologoj, kaj via orelo aŭdas... lecionon de la Zamenhofa lingvo. Enirinte la koridoron, vi estas ĝojigita de okulfrapaj verdstelaj murgazetoj: unu, du, tri...

Kio okazis? En la Bazo por Teknika Evoluado oni fondis E-societo. Entuziasmo? Jes, ĉar la plejmulto de la membroj estas gejunuloj. Kelkaj jam lernis la lingvon en la loka gimnazio kaj ekamis ĝin. Ĉi tie oni kun estimo parolas pri la praktika uzado de la lingvo en nia entrepreno. Pruvoj? Amasa celebrado de la Zamenhofa naskiĝtago kun partopreno de la tuta kolektivo. Regulaj (2 fojojn semajne) lecionoj de Esperanto. Ĉiuj gekursanoj - senes-

cepte — estas abonaatoj de „Bulgara Esperantisto.“ Jam flugas tra la mondo la unuaj leteroj kune kun la revoj pri senperaj kontaktoj, gastadoj...

Nova torĉo ekbrulis. Novaj soldatoj de la paco staras ĉe posteno.

Hristo Manolov

Eksterlandaj amikoj, sendu materialojn por urba ekspozicio je temo „La mondo tra la fenestro de Esperanto“ kaj leterojn por letervespero fine de aprilo. Ĉiu korespondanto ricevos respondon, ĉiu sendinto de materialo — donacon. La plej efektaj materialoj estos premiitaj. Adreso: **Baza za tehniĉesko razvitiĉe, Esperanto, Polski Trâmbeŝ, Bulgario.**



ZAMENHOF-CELEBROJ

Varna. E-Societo „Albatro“ organizis solenan celebren de nia Majstro okaze de lia 112-a naskiĝtago. La solenaĵo okazis en la granda salono de kafejo „Trakia“. Ĉeestis pli ol 120 esperantistoj kaj gastoj. Pri la senmorta afero de Zamenhof parolis en Esperanto docento Georgi Dimov, ĝisnuna prezidanto de „Albatro“, kun tuja traduko en bulgara lingvo de Ivanka Nedelčeva, studentino, kiu nur antaŭ unu jaro ellernis la Internacian Lingvon. Sekvis belarta programo. Ĉiu ĉeestanto estis ornamita per „Verda Stelo“, ellaborita el plasto de Georgi Cvetkov. Sekvis popolaj kaj modernaj dancoj.

Albatrano

Plodiv. Komence de decembro sur la plej vivoplena strato de la urbo estis aranĝita interesa vitrino kun fotoj kaj materialoj pri d-ro Zamenhof kaj pri la Esperanta libro. La vitrino allogis la atenton de la loĝantaro. La 18-an de decembro pli ol 80 esperantistoj kolektiĝis en restoracio „Bulgario“. Antaŭ ili pri nia kara Majstro parolis Ivan Bataklijev. La E-poetoj T. Ajolov kaj Ĥr. Dodov legis siajn versaĵojn, dediĉitajn al Zamenhof kaj Esperanto. La belartan programon partoprenis V. Kurteva, P. Bojaĝieva kaj K. Bakârĝieva. Okazis komuna vespermango. Sekvis dancoj, gaja amuzado.

Fani Miĥajlova

CELEBRO DE ZAMENHOF EN KAUNAS

La 11-an de decembro en urbo Kaunas (Litova SSR) okazis brila celebrazo de la 112-a naskiĝtago de d-ro L. L. Zamenhof. La solenan kunvenon ĉeestis ĉirkaŭ 240 esperantistoj el ĉiuj anguloj de Litovio, ankaŭ multaj gastoj el Riga (Latva SSR), el Minsk (Belorusa SSR) k. a. La kunvenon malfermis A. Vebeliunas — prezidanto de la E-Klubo en Kaunas.

Artprogramon prezentis esperantistoj de E-Klubo „Juneco“ el Vilnius, kaj apartaj esperantistoj el Klaipeda, Kretinga k. a.

La sekvan tagon en la Kulturdomo de la profesia Unuiĝo la kunvenintoj aŭdis reciprokajn informojn pri la E-agado en siaj urboj. Okazis ankaŭ „baptado“ de novaj esperantistoj, ĵus finintaj E-kurson, gviditan de la instruitino A. Baltrušene. La ceremonion de la baptado partoprenis la maljuna esperantisto, konata vojaĝanto, arkeologo Antanas Poška el Vilnius, kiu antaŭ la dua mondmilito loĝis kelkan tempon en Bulgario. Tie li interesiĝis pri „Devetaška Peŝtera“, pri la laboro de la bulgaraj arkeologoj k. a.

J. Puodziunas

La E-kurso. Sidas: la kursgvidantino A. Baltrušene, prof. A. Poška — E-veterano, V. Šilas.
Foto de Puodziunas J.

NIJ JARKUNVENOJ

„Maksim Gorkij“ — Sofio. La jarkunveno de „M. Gorkij“ — la plej granda E-Societo en nia lando, okazis la 22-an de decembro 1971. Ĉeestis pli ol 200 membroj. Reprezentantoj de la Estraro de BEA estis la prezidanto N. Aleksiev kaj la sekretario St. Kostadinov. Raporton pri la agado dum la lastaj pli ol du jaroj tralegis la prezidanto Nano Nanov. Li substrekis, ke la Societo disvolvis aktivan agadon en interna cia aspekto organizis kelkajn kunvenojn proteste kontraŭ: la usona agreso en Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo; pli ol 100 ĝiaj membroj vizitis la UK de Esperanto en Helsinko, Vieno, Londono kaj multajn E-renkontigojn, konferencojn k. s. en Hungario, Pollando, Germanio, Sovet-Unio. La Societo interfratiĝis kun la E-klubo en Liberec, Ĉeĥoslovakio, kun kiu ĝi subtenas kontaktojn, interŝanĝas E-materialojn ktp. Tre viglaj estas la kontaktoj de la societaj membroj kun sovetaj esperantistoj.

La kulturkleriga agado de la Societo estis bona. Regule, unu fojon ĉiusemajne okazis kunvenoj, en kiuj oni traktis ĉirkaŭ 130 diversajn temojn, aŭ celebris datrevenojn, aranĝis „viktorinojn“ ktp. akompanatajn de artprogramoj, kiujn partoprenis niaj esperantistoj-artistoj.

En la kursoj, organizitaj de la Societo, dum la lastaj du jaroj Esperanton lernis pli ol 200 gekursanoj.

La raporto notis, ke pro grandaj meritoj al la E-movado la estraro de „M. Gorkij“ elektis kiel „honorajn membrojn“ la samideanojn Atanas D. Atanasov — Ada, Simeon Petkov, Ivan Sarafov, St. Minkov kaj Meleŝko Ŝiŝkov.

Post viglaj diskutoj pri la agadraporto oni elektis novan estraron: prezidanto Nano Nanov, vicprezidanto Ivan Keremidčiev, sekretario Penka Jovčeva, kasistino Veselina Vasileva, kulturkleriganto Belka Beleva, turismo Atanas Jančev kaj membro Nikola Mladenov.

Belka Beleva



„Diĉo Petrov“ — Sofio. La ĵarkunveno de la Sofia Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“ okazis la 23-an de decembro. Reprezentanto de CK de BEA estis la sekretario Ivan Sarafov. Raporton pri la ĝisnuna agado tralegis la prezidanto de la Societo Kunĉo Vălev. La kulturkleriga laboro estis bona. Speciale notinda estas la aktiveco de la Instruista E-Klubo ĉe la Centra Domo de la Instruisto, kiu ĉiusemajne okazigas ordinarajn kunvenojn. Unu fojon ĉiumonate estas organizataj ĝeneralaj kunvenoj, en kiuj oni traktas pli gravajn problemajn demandojn. Nesufiĉa estis la kursa laboro de la Societo.

En la viglaj diskutoj oni rekomendis pli grandigi la nombron de la membroj el inter nuntempe laborantaj instruistoj, dividi la membraron en grupojn kun apartaj respondecaĵoj, plifortigi la ekskursojn kaj renkontiĝojn kun aliurbaj E-societoj, utiligi pli bone ĵurnalon „Uĉitelsko Delo“ („Instruista Afero“) por nia propagando ktp.

La novelektita estraro konstruiĝis jene: prezidanto Kunĉo Vălev, vicprezidanto Marin Băcev, sekretario Jordan Markov, kasistino Janka Daskalova, kulturkleriganto Ljubka Mandalova, kursa laboro Zahari Ivanov, propagando Boris Simeonov.

Jordan Markov

„Verda Eskadrono“ — Târgoviște. La ĵarkunveno okazis la 23-an de decembro en la Kulturdomo de la urbo. En la ĵarraporto, legita de la societa sekretario Raŝko Nenov, oni substrekis, ke la E-movado en la urbo dum la pasinta jaro estis plej bona ol ĉiam ajn dum la lastaj jaroj dank' al la senlaca laboro de l'estraro kaj la helpo de la gvidantoj de urbo. La nombro de la membroj konsiderinde kreskis. En la momento 10 E-kursoj funkcias en diversaj entreprenoj kaj

lernejoj. La Societo tre bone prezentis sin en la nord-orienta E-renkontiĝo en Madara kaj preparas sin por nova simila renkontiĝo, kiu okazos komence de junio en Târgoviște. La Festivalon en Jambol partoprenis 54 membroj, kies vojaĝelspezojn pagis la Fako „Popola Instruado“ kaj la Sindikatoj. Oni ankaŭ pagis ĉion necesan al la junpionira grupo, kiu partoprenis la IV-an Internacian Junpioniran Tendaron ĉe Balatono, kaj al alia grupo, kiu ekskursis al multaj eŭropaj landoj kaj partoprenis la Turistan Renkontiĝon en Szeged, Hungario.

Ĉe la ĵarkunveno estis fonditaj E-sekcioj de junuloj, instruistoj, medicinistoj, turistoj, lernantoj.

Fine oni projektiis amatorfilmon pri la vizitoj de la lokaj esperantistoj en diversaj landoj dum 1971.

La kunveno pasis en etoso de granda entuziasmo kaj laborpreteco.

Maria Rajčeva

„D-ro Zamenhof“ — Razgrad. La ĵarkunveno, okazinta la 14-an de decembro, komenciĝis per prelego de Marin Deskov pri la vivo, ideoj kaj agado de Zamenhof. Ĉeestis dekoj da lernantoj kaj urbanoj.

Raporton pri la ĝisnuna agado legis la societa prezidanto Kalĉo Panov. Dum la pasinta jaro en la urbo funkciis kelkaj E-kursoj. Malgraŭ tio oni taksis la agadon kiel nesufiĉe bonan, „sub la realaj ebloj“.

La novelektita estraro fronte kun Kalĉo Panov promesis labori sindone por atingi pli grandajn sukcesojn.


Dimo Dimov

„Internacia Amikeco“ — Dimitrovgrad. La ĵarkunveno okazis la 1-an de decembro en la Kulturdomo de la Ministo. Krom la multnombra publiko la kunvenon ĉeestis Kiril Georgiev — reprezentanto de la CK de BKP, Georgi Idakiev — prezidanto de la DK de BEA en Ĥaskovo, Vladi Vălĉev — honora prezidanto de la Societo kaj veterano de la E-movado.

La kunveno komenciĝis per artprogramo, prezentita de junpioniroj-esperantistoj el lernejo „Ljuben Karavelov“ sub la gvido de l'instruistino Penka Geleva.

Ĵarraporton pri la agado legis la prezidanto Ĵeko Zaprjanov. Sekvis viglaj diskutoj. Lige kun la 25-jara datreveno de la urbo, la 90-a naskiĝtago de G. Dimitrov, la 30-jara datreveno de la fondiĝo de l' Paŝrolanda Fronto kaj la 38-a Kongreso de la bulgaraj esperan-

La Esperanta Domo apud v. Borima invitas ĉiujn esperantistojn gastigi al ĝi kaj al la lokaj esperantistoj. Gastoj anticipe anoncu sin al: Ĥristo Vodeničarov, v. Borima, Lo-veĉ-distrikto.



tistoj estis akceptita solena promeso-alvoko pri vigligo de la agado.

Oni elektis novan estraron fronte kun Ĵeko Zaprianov kiel prezidanto.

Tr. Trendafilov

„Albatro“ — Varna. La jarkunveno okazis la 26-an de decembro. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la urbaj komitatoj de BKP kaj Komsomolo. Kiel prezidanto de la nova estraro estis elektita Georgi Cvetkov — ĝisnuna vicprezidanto.

Albatrano

„Studenta Amikeco“ — Varna. La jarkunveno okazis la 29-an de decembro. Ĉeestis 30 studentoj el la tri superaj institutoj en la urbo. Kiel reprezentanto de la distrikta komitato ĉeestis docento Georgi Dimov, lektoro de Esperanto en VINS „D. Blagoev“, kiu salutis la studentojn per la bona iniciato vigligi la agadon de la Societo, kiu en la pasinteco estis unu el la plej viglaj studentaj E-societoj.

Estis elektita estraro: prezidanto Ivan Dikov, vicprezidanto Ruĵka Kostadinova, sekretario Nezabravka Marinova, kasisto Evgenia Dimova, propagando — Vasil Ĵekov, membroj Stefka Georgieva kaj Janka Berova.

Albatrano

„David Sasonov“ — Asenovgrad. La jarkunveno okazis la 14-an de januaro. Ĉeestis pli ol 30 membroj kaj Miĥail Danĉev — reprezentanto de DK el Plovdiv. Jarraporton legis la societa prezidanto d-ro Otonov. En la raporto kaj la diskutoj oni esprimis kontenton pri la ĝisnuna laboro kaj firman decidon aktivigi ĉiuflanke ĝin. Malgraŭ ke la kunveno estis sufiĉe longa — pli ol du horojn kaj duonon, neniun ĝi tedis, male — ĉiuj estis kontentaj, ĉar en la atmosfero regis sincera kritiko kaj memkritiko, preteco por vigla estonta agado.

Kiel prezidanto reelektiĝis d-ro Otonov.

Atanas Gaev

TRA MEZ-EŬROPO PER ESPERANTO

La Turista Sekcio de E-Societo „Espero“ en Blagoevgrad regule organizas eksterlandajn ekskursojn por siaj membroj.

En 1971 grupo de 16 societaj membroj faris ekskurson laŭ jena vojo: Varsovio—Torun—Berlino—Drezdeno—Lajpcigo—Potsdamo—Prago—Bratislava—Budapeŝto—Sinaja—Bukureŝto. La ekskurso daŭris 23 tagojn, dum kiuj ni vizitis kvin landojn. Ĉie ni estis helpataj de niaj samideanoj-esperantistoj, pro kio ni multe dankas ilin.

Ĉiuj partoprenintoj en la ekskurso restis ege kontentaj.

Georgi Markov

La ekskursantoj antaŭ la Monumento de la Soveta Ploranta Patrino en parko „Trep-tov“ — Berlino.

EN LA VALO DE LA ROZOJ

La Esperanto-Societo „Roza Valo“ en urbo Kazanlâk ĉi-jare celebris la 112-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof kune kun samideanoj el la Rozvala Regiono. En la vestiblo de Legejo (Kulturdomo) „Iskra“ trovas lokon Esperanto-ekspozicio. Portretoj de herooj-esperantistoj el tiu regiono, pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo, renkontas la vizitantojn. Ĉiu nomo prezentas historion. Abundas rememoroj pri estintaj kaj forpasintaj samideanoj. Ni, gastoj el Sofio, turnas nin al la deĵorantoj, petante klarigojn. Ekestas spontana konversacio, kaj la unua neprogramita punkto de la solenaĵo — la interkonatiĝo — komenciĝas.

Nia sofia kvaropo esprimis deziron viziti la plej aĝan el la esperantistoj en la urbo kaj eble en la lando — k-don Penko Petrov. En vespera horo altirataj de l'aerfreŝeco kaj la majesta silueto de Balkan-montaro, ni direktas nin al la pensiono por maljunuloj.

En la periferio de l'urbo leviĝas solida kelketaĝa konstruaĵo kun vasta parko. En la televida salono oni ne povas trovi la sofianon. Post kelkaj minutoj el ĉambro 173 aŭdiĝas Esperanto-parolo. La intervjuanto, s-ano Atanas D. Atanasov, pioniro de la E-Movado en Bulgario, interesiĝas pri personoj kaj eventoj ligitaj kun la unua periodo de la Internacia Lingvo en nia lando. Kaj la 92-jara aĝo de Penko Petrov ne malhelpas lin respondi precize kaj flue pri eventoj, datiĝantaj ekde 1905,



La morgaŭan tagon, dimanĉe, la vetero estas neordinare milda, sunoplena. Kvazaŭ eĉ la naturo dezirus kunfesti. Oni sentas la vivigan spiron de la mirinde bela Valo de la Rozoj.

Baldaŭ la granda salono de la centra klubo „Lenin“ pleniĝas. Junuloj kaj grandaĝuloj atente aŭskultas la salutparolon de la prezidanto Dima Martinov. Ĝi estas adresita al la venintoj el Sofio, Stara Zagora, Karlovo, Ŝipka, Sliven k. a. La anoncantino Ŝinka Geneva per sia melodia parolmaniero invitis la preleganton Asen Grigorov raporti pri la Esperanto-poezio. La donitaĵoj pri la evoluo de la Esperanto-poezio estas koncizaj. Pli emfazitaj estis la verkoj, originalaj kaj tradukitaj de la bulgaraj esperantistoj. Paralele kun la nomoj de la unuaj majstroj de la verk- kaj traduktkreado Ivan Dobrev, Dimitr Zlatarski, Simeon Simeonov, Ĥristo Marinov — Ĥrima, Atanas D. Atanasov — ADA, Stefan Kiraĝiev k. a. — viciĝas la nomoj de novaj poetoj: Venelin Mitev, Ljuba Bojaĝieva, Todor Ŝoŝev k. a. Kelkaj fragmentoj el tradukitaj bulgaraj versaĵoj ilustras la taŭgecon de la Internacia Lingvo kiel traduklingvo en la kampo de poezio kaj la talenton de la interpretantoj. Sekvas demandoj, al kiuj la preleganto detale respondas.

Sur la podio aperas nia E-veterano kaj membro de la Esperanta Akademio Atanas D.

RENKONTIĜO KUN ESPEPANTO-VETERANO

Ni veturas al Kazanlik. Ni — kvar geesperantistoj el Sofio: Rajna Arnaudova, Radka Ruĵanova, Asen Grigorov kaj mi. Responde al invito de la kazanlikaj samideanoj ni partoprenos morgaŭ ilian ĉi-jaran Zamenhof-feston.

Agrable estas pensi pri atendata renkontiĝo. Sed ni ne forgesas, ke en Kazanlik nun loĝas ankaŭ du gesamideanoj, kiuj eble ne scias pri la organizota solena kunveno. En tiu ĉi urbo ekzistas pensionoj por maljunaj, restintaj solaj en la vivo, kiuj bezonas prizorgon. En unu el ili loĝas Anastasija Baklarova, kiu per nobla faro atestis sian amon al Esperanto: ŝi donis sian domon en vilaĝo Gabarevo al la loka Esperanto-Societo kaj mem serĉis trankvilan modestan vivon en la pensio (pri tio vi povas legi en „Bulgara Esperantisto“ 1971, n-ro 7/8, paĝo 8). En alia pensio loĝas la malnova pioniro de Esperanto Penko Petrov el Jambol, kiu dum la lastaj jaroj, enloĝinte en la ĉefurto, estis regula partoprenanto de la semajnaj kunvenoj de la sofiaj esperantistoj. Sed lastatempe oni jam ne vidas lin inter si: li transiris en la azilon.

Naskita en 1880, Penko Petrov enpaŝas jam en sian 92-an jaron. Esperanton li lernis en 1900 kaj restis sindona kaj aktiva esperantisto ĝis nun.

Urba aŭtobuso portas nin tra noktaj stratoj. Ni informiĝas, ĉe kiu haltejo ni devas elbu-

Atanasov — ADA, kiu parolas pri la Esperanto-literaturo — temo treege ampleksa por esti skizita en mallonga tempo.

Sekvas bela literatura programo. Honore al Zamenhof eksonas lia versaĵo „La Vojo“, plenumita de k-do Momĉilov. K-do Kurumilev artisme recitas la faman parolon de G. Dimitrov antaŭ la faŝista tribunalo en Leipzig; li plenumas ankaŭ la poemon „Disiĝo“ de Ĥr. Botev. La operkantistino Rene Jordanova el Stara Zagora per kantado kaj deklamado kontribuas al la programo. La eta Dora Pârvova kortuŝe kantas „Ĝstu ĉiam la suno“. Eksonas aktuala versaĵo dediĉita al Anĝela Davis, interpretata de Svoboda Damjanova. Sekvas muzikaĵoj kaj pentrado, plenumataj de lernantoj-kursanoj de Esperanto.

Okaze de la celebro de Zamenhof la Societo „Roza Valo“ en Kazanlik ricevis plurajn salutleterojn el 12 landoj. La leteroj, kiuj esperimas amikajn sentojn kaj bondezirojn por komuna porpaca laboro, estas aplaŭde renkontataj.

La kunveno estas unu el la aranĝoj, atestantaj pri aktiviĝo de la esperantistoj en la Valo de la Rozoj lige kun la antaŭstaranta 38-a landa esperantista kongreso, okazonta en Smoljan.

R. Arnaudova

siĝi. En la fundo de malgranda strato brilas la fenestroj de la pensiono. Ni marŝas en la malumo inter du vicoj da kortoj kaj malaltaj domoj kaj jen ni troviĝas en ĝia luma vasta koridoro. En teretaĝa salono la enloĝantoj spektas televidon. Senbrue ni penetras, sed konstatas, ke nia amiko ne estas ene. Asen Grigorov iras en la kancelarion, ricevas la necesan informon kaj kondukas nin al la ĉambro de Penko Petrov. Ni frapetas sur la pordon. Ĝi malfermiĝas, kaj kontraŭ ni ekstaras la kompakta figuro de li — malgraŭ la granda aĝo, fortika kiel Balkan-montara kverko. Post la unua surpriza ekmiro tra liaj plurdioptriaj okulvitroj ekbrilas la konata bonanima rideto. Li invitas nin en la ĉambron. Ĝojon portas al li nia neatendita vizito. Ni rapidas sciigi la celon de nia estado en Kazanlik kaj de la speciala veno al li. Li estas kontenta, tre kontenta pri nia zorgo. Ĉu li venos al la solenaĵo? Sed ja nepre! Ĉu ni povus supozi alion?

Kaj sekvas agrabla intersamidea konversado. Li mergiĝas en rememoroj.

Mi konas lin delonge — en 1909 ni renkontiĝis en la 3-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantoj en Ruse kaj de tie ni transiris al la 1-a Kongreso de la Rumanaj Esperantistoj. Li rememoras la ekskurson al Sinaja — la reziĝejo de la tiama rumana reĝa familio, kie la reĝino-patrino Elizabeta, mem cesperantistino,



(kiel verkistino konata sub la pseŭdonimo Carmen Silva) akceptis la kongresanojn. Penko, ortodoksa socialisto, ne deziris eniri la palacon kaj ne faris al la kronportanta samideano honoron per sia ĉeesto. Sed en la stacidomo de Sinaja li esprimis al rumanaĵ samideanoj deziron renkontiĝi kun konata rumana socialisto, loĝanta en tiu loko; oni vokis laŭte, plenvoĉe la nomon de la serĉato — kaj la dezirata renkontiĝo okazis! . . . En iu periodo poste Penko havis aferajn rilatojn kun mi kaj ĉiam serĉis min kiel samideanon. Ĉiam li restis neŝancebla esperantisto, fidela kaj persista. Ĉirkaŭ 1910—1913 li sendis korespondadojn al la tiam „Internacia Socia Revuo“.

Nun mi havis apartan peton al li: en lia Esperanta arkivo mi legis iam leterojn de Bollingbrocke—Mudie kaj de aliaj tiam elstaraj alilandaj esperantistoj (de Zamenhof, bedaŭrinde, li ne havas leteron); en Sofio mi sugestis al li deponi tiujn ĉi leterojn en la Bulgaran

Esperanto—Muzeon. Li tiam hezitis: lia filo, loĝanta en Jambol, estas mem esperantisto, kaj Penko preferas lasi sian arkivon herede al li. Nun mi insistis, ke li donu al la Muzeo fotokopiojn de la leteroj, kiuj povus prezenti intereson por la historio de la Esperanto—Movado. Pri tio ĉi li konsentis. . .

*

Ni revenis en la hotelon tre kontentaj de tiu ĉi pli ol unuhora konversado. Tiaj renkontiĝoj refreŝigas kaj impulsas.

La sekvan matenon, alveninte en la salono de la solena kunveno, ni trovis Penko Petrov jam veninta — soldato sur posteno! Inda reprezentanto de la samideanoj el la malnova generacio, kiuj metis la firman fundamenton de la Bulgara Esperanto-Movado. Tie ĉi estis ankaŭ Anastasija Baklarova — ankaŭ ŝi sur posteno.

A. D. Atanasov



LA BATALEMA KULTURSOCIETO EN PROLETA „KONJOVICA“

Tiu, kiu konas la kvartalon „Konjovica“ en la obskuraj jaroj de la faŝisma-kapitalisma pasinteco kaj partoprenis en la socia kaj kultura vivo de Sofio, ne povas ne memori la rolon, kiun ludis en nia ĉefurbo la popola kultursocieto (legejo) „Hristo Botev“. Ĝi estis konata en ĉiuj urbopartoj kaj ofte transformiĝis al vera idea abelujo, kie donis al si renkonton la plej batalemaj reprezentantoj de la laboristaro kaj de la intelektularo.

Verŝajne aliaj rakontos pri la prelegoj de Todor Pavlov, Sava Ganovski, Todor Samodumov kaj pluraj aliaj elstaraj niaj laboristaj ideologoj, kiujn la soifa por scioj proleta kaj studenta publiko aŭskultis kun intereso. Mi volas rakonti pli speciale pri la rolo de tiu ĉi fama kultursocieto en la vivo kaj la agado de la laborista Esperantomovado en la ĉefurbo.

En tiu tempo (1928—29) la Sofia Laborista Esperanto-Societo havis sian „sidejon“ en la loĝejo de kamarado Simeon Petrov, proksime de la kul-

turdomo „Hristo Botev“ — sur strato „Ŝar-planina“ n-ro 56. Unu-du jarojn poste tie lokiĝis ankaŭ la Centra Komitato de la Laborista Esperanto-Asocio, fondita en 1930. Por la laboristoj-esperantistoj plej solida „bazo“ por realigo de ilia agado estis la kulturdomo „Hristo Botev“.

Kiam ni sukcesis havigi al ni unu ekzempleron de la soveta Esperanta lernolibro de ing. Rubljov, oni komisiis al mi okazigi la unuan kurson laŭ la interesa sistemo de tiu ĉi aŭtoro.

La kurso estis organizita en la kulturdomo „Hristo Botev“. Ĉar la tiam salono ne estis granda, ĉirkaŭ la ronda tablo povis sidigi nur 20—30 personoj. Tial ni anoncis, ke ni akceptos limitan nombron da kursanoj. Evidentiĝis tamen, ke la dezirantoj estas tre multaj kaj superas la eblojn de la salono en la kulturdomo por normala kurslaboro. Ni avertis la kandidatojn, ke ili devas stari en la ejo, tamen ili ne rezignis, kaj ni devis akcepti ilin.

La laboro komenciĝis. Neniu for-

lasis la kurson, eĉ pli — baldaŭ venis studentoj de filologio por vidi, kiel laboristoj, ne tre instruitaj, sukcese komencas jam post la unuaj lecionoj paroli en Esperanto (ja tamen — fremda lingvo!). Tiel la nombro de la kursanoj, malgraŭ la malfacilaj labor-kondiĉoj, anstataŭ malpliigi, konserviĝis kaj eĉ pligrandiĝis.

Iun fojon en la salonon venis la tiam fama bulgara esperantisto d-ro Zahariev kaj vidinte tiom da kursanoj, venis al mi kaj demandis, ĉu ni nun malfermas la kurson. Li konis sufiĉe bone la tipan por la tiama tempo enskribiĝon de dekoj da homoj en la komenco de la kurso, el kiuj ĝis la fino restis nur kelkaj. Mi diris al li, ke nia kurso daŭras jam tri monatojn, ke la homoj venas regule kaj lernas preskaŭ starante. Li restis tre mirigita, sed aŭdinte kion mi instruis kaj kiel la kursanoj respondas, li konvinkiĝis, ke la kurso jam iras al sia fino. Kun malkaŝita miro li observis la kursanojn, kiuj post la malfacila labortago en fabrikoj, laborejoj aŭ aŭditorioj venis, ne havante eblecon almenaŭ sidigi, kaj kun intereso sekvis kaj ekposedis la instruatan materialon.

Inter la kursanoj formiĝis ne nur bonaj esperantistoj, sed ankaŭ abnegaciaj organizantoj de la Laborista Esperanto-Asocio, perfektaj revoluciuloj, iuj el kiuj fordonis eĉ sian vivon por la libereco de la bulgara popolo. Sufiĉas menciigi ĉi tie nur la nomojn de Nikola Ŝopov kaj Ĥristo Nikov — du dolĉajlaboristoj, kiuj estis pendumitaj en la Sofia Centra Malliberejo kiel aktivaj partoprenantoj en la batalo kontraŭ la germanaj okupantoj kaj iliaj bulgaraj servistoj. Nikola Ŝopov estis longe ankaŭ sekretario de la Laborista Esperanto-Asocio.

Foje ni organizis literatur-muzikan amuzaĵon en la salono de la kultur-societo en la nomo de la Sofia Laborista Esperanto-Societo. Estis dimanĉe antaŭtagmeze. La festo pasis normale, la po-

lico ankoraŭ ne estis eksciinta pri ĝi. Sed iu el la gardostarantaj policistoj decidis tamen vidi, ĉu oni ne faras ion malpermesatan en la ruĝa kulturdomo. La policisto vidis la plenan salonon. Sur la scenejo iu ludis fluton. Li ne komprenis, kiel statas la afero, kaj vokis la organizantojn. Kamaradino Nadja Pĉelinska venis al mi kaj flustris, ke mi devas aperi antaŭ la policano. Li demandis min, kial ni kunvenis kaj ĉu ni havas permeson por „publika kunveno“. Mi klarigis, ke tio ne estas kunveno, sed kurso por instruado de fremda lingvo kaj nun okazas la ekzameno. Tamen ĉar en la kurso partoprenas ankaŭ blinduloj (ĝuste en tiu momento unu blindulo ludis fluton sur la scenejo), mi ne donas al ili demandojn, sed postulas, ke ili ludu ion, ĉar ili ĉiuj estas muzikistoj. La gardanto de la ordo kontentiĝis per tiu naŭva klarigo kaj trankvile revenis al sia loko, kaj ni ankoraŭ pli trankvile daŭrigis nian feston. . .

En la somero de 1930 ni decidis organizi nacian konferencon de la laboristaj Esperanto-societoj el la tuta lando por krei Laboristan Esperanto-Asocion. Ni pripensis, kie ni povus okazigi la konferencon konspire, ĉar la polico nepre fiaskigus ĝin kaj arestus la delegitojn, se ĝi sciis kiam kaj kie ni kunvenos. La legalaj laboristaj organizaĵoj estis sisteme persekutataj, malgraŭ ke formale ilia agado estis „permesita“. Ni decidis kunveni ĉirkaŭ la kulturdomo „Ĥristo Botev“, ŝajnigi, ke ni havas laboron en ĝi kaj neri-markite eniri la najbaran tenejon de lignomaterialo, kie fakte ni devis okazigi la konferencon. La manovro sukcesis, kaj ni faris tre utilan laboron: ni fondis nacian organizaĵon de la laboristoj-esperantistoj, kiu metis la Internacian Lingvon en servo de la noblaj idealoj de la proleta liberiga movado. Tiamaniere ni kreis organizon bazon por disvastigo kaj popularigo de Esperanto en vastaj medioj de la progresema intelek-



tularo kaj de la laborista klaso. Kultursocieto „Ĥristo Botev“ ne nur helpis al ni kaŝi de la polikanoj nian konferencon, sed poste ankaŭ servis al ni por okazigo de diversaj iniciatoj de la novefondita Laborista Esperanto-Asocio, kiu fariĝis membro de la Internacio de Proletaj Esperansistoj kun sidejo en Berlino. Tial ni kun amo rememoras tiujn jarojn de abnegacia batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, kontraŭ la naciismo kaj ŝovinismo, plantataj de la burĝaro, por interna-

ciisma edukado de la laborista klaso kaj de la ceteraj laboruloj, por eterna amikeco kun la sovetaĵ popoloj, por socialisma Bulgario.

Bedaŭrinde, trafinte poste en la malliberejon, mi ne povis partopreni la batalon de la sofia laborista klaso kaj de la laborista Esperanto-movado kaj mi ne scias, kiel post 1934 la progresmaj homoj en nia ĉefurbo utiligis la kultursocieton Ĥristo Botev.

Nikola Aleksiev

NI RECENZAS

„HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO“

Eldono de la Esperanto-Sekcio ĉe Litova Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, tria kajero, Vilnius, 1971.

La ĉefartikolo „1941-1971 — tridekjara datreveno“, memorigante pri la hitlerista invado en Sovetunion kaj la terura kvarjara milito, atentigas pri la konstante eksplodantaj jen en unu, jen en alia loko de la terglobo militaj konfliktoj, pri la minaco de nova milito en terglobo skalo. Ĝuste pro tio la registaro de USSR turnis sin al la registaroj de aliaj nukleaj ŝtatoj kun propono kunvoki konferencon por trakti la eblecojn de nuklea senarmigo. La ĉefartikolo finiĝas per citaĵo el alvoko de la Soveta Komitato por Defendo de la Paco kaj de la Soveta Komitato de Veteranoj de la Milito al ĉiuj homoj de bona volo en ĉiuj landoj de la tero fari ĉion eblan por firmigi la pacon kaj la internacian sekurecon, por eviti novan eksterman militon: „Tio estas nia devo por tiuj, kiuj falis el la lukto kontraŭ la faŝismo. Por patrinoj vidvinoj kaj orfoj, kies feliĉon forprenis la milito. Tio estas nia devo por niaj infanoj kaj nepoj, por la venontaj generacioj. Ni devas unuigi la penojn de ĉiuj popoloj en lukto kontraŭ la fortoj de agreso kaj militarismo, por triumfo de la granda pacafero inter la nacioj.“

Multaj materialoj estas dediĉitaj al la ekonomia progreso de Socialisma Respubliko Litovio, al la nuntempa litova literaturo, muziko, muzea afero, radio k. a.

Pli ol la duono de la paĝoj de la kajero estas dediĉitaj al Esperanto-problemoj kaj vivo de la sovetaĵ kaj litovaj esperantistoj. Tre interesa, enhavoriĉa kaj utila estas la artikolo de A. Vaitilavičius „La riĉeco de Esperanto kompare kun naciaj lingvoj“, daŭrigata

en kelkaj kajeroj de „HSL“.

En informo „Labortaĉmento Esperanto-71“ E. Eselinas rakontas pri la esperantista laborbrigado en kolhozo „Svetlaja Poljana“, provinco de Novosibirsk, de la 10 julio ĝis la 25 de aŭgusto 1971 (partoprenis 63 gejunuloj el 11 urboj; la laboro estis filmita kaj demonstrita de la televido).

Detalaj materialoj informas pri la XIII Balta E-Tendaro, pri la V-a Konferenco de Soveta Esperantista Junulara Movado kaj la Somera Esperanta Junulara Tendaro. (Tiujn tri materialojn ni prezentas ĉi-sube aparte pro la graveco de la aranĝoj).

Speciale interesa estas la artikolo „Maksim Gorkij pri Esperanto“ de A. Vaičiulis.

La tria kajero de „Horizonto de Soveta Litovio“ informas ankaŭ pri celebrazo de la fama estona Esperanto-poetino HILDA DRESEN lige kun ŝia 75-a naskiĝtago, kiu okazis en majo 1971. La talinaj esperantistoj organizis brilan festkunvenon dediĉe al H. Dresen — kun salutoj, floroj, memordonacoj, recitoj el ŝia verkaro. Grandan atenton al la merita poetino turnis ankaŭ la Estona Televido, kies reprezentantino vizitis ŝin hejme, kaj oni povis observi en televido la poetinon mem, vidi ŝiajn verkojn kaj aŭskulti rakonton pri ŝia vivo kaj laboro. Dum ŝia longa vivo Hilda Dresen verkis multajn originalajn versaĵojn, ankaŭ multe ŝi tradukis el estona, rusa, germana kaj aliaj lingvoj — entute 94 poetoj! (En la nuna numero de nia gazeto ni prezentas la poetinon per ŝiaj verkoj — originalaj kaj tradukitaj).

Entute ni povas diri, ke la tria kajero de „Horizonto de Soveta Litovio“ estas riĉa kaj varia laŭ enhavo kaj belaspekta laŭ eksteraĵo. Ni sincere ĝojas pri tiu sukceso de niaj litovaj kamaradoj kaj deziras al ili pliajn venkojn.

K. Vālev



La 6—16 de aŭgusto en pitoreska nordlatva urbo Smiltene okazis la XIII Balta Esperanto-Tendaro (BET). Al la tendaro venis esperantistoj ne nur el la Baltaj respublikoj, sed ankaŭ el multaj aliaj lokoj de Sovet-Unio (eĉ el Meza Azio). Partoprenis 253 personoj. La plejmulto de la partoprenantoj loĝis en la komunloĝejo de la loka teknikumo, aliaj en tendoj ekster la urbo, ĉe rivero, en la sino de la naturo.

En la tendaron esperantistoj venis ne nur ripozi kaj ĝui la belegan ĉirkaŭan naturon, sed ankaŭ trakti siajn komunajn aferojn, interŝangi spertojn, renkontiĝi kaj fari novajn kontaktojn.

La plej gravaj aranĝoj estis: somera universitato, gvidata de la verkistino N. Andrianova, libera tribuno, du kursoj (komenca kaj perfektiga), vesperfestoj-koncertoj de apartaj popoloj, ekskursoj.

En la prelegoj de la somera universitato precipe notindaj estas tiuj de doc. S. Podkaminer — „Socialismo kaj Esperanto“, de N. Andrianova — „Problemoj de Esperantostilo“, de doc. B. Tokarev — „La humanismo en la Esperanta literaturo“.

Funkciis sekcioj de pedagogoj, ĵurnalistoj, verkistoj kaj tradukistoj, naturdefendantoj, gimnastikuloj. La pedagogia sekcio okupiĝis pri plua preparado de Esperanto-instruistoj, pri preparo kaj eldono de lernolibroj. Laboristoj de la plumo legis siajn verkojn, diskutis pri problemoj de stilo kaj formo.

Grandan intereson vekis la bulteno de naturamantoj de Tallinn pri planata por julio 1972 en Estonio kunveturo de naturamikoj-esperantistoj.

* La materialojn „Balta Esperanto—Tendaro“, „Epizodoj el la 5-a“ kaj „Ĉe vasta Dnipro“ ni represas el „Horizonto de Soveta Litovio“ n-ro 3/1971.



La tendaraj tagoj komenciĝis per matena gimnastiko, gvidata de Zoja Skvorcova.

La Organiza Komitato aranĝis du ekspoziciojn: Esperanto-eldonaĵoj kaj infandeseĝnaĵoj el la tuta mondo. La du ekspozicioj kompletigis fotostandojn pri la agado de l'esperantistoj en la Baltaj respublikoj kaj fotokonkurso.

Lokaj agantoj de l'instruado kaj lernantoj precipe interesiĝis pri la infandeseĝna ekspozicio el la tuta mondo, enhavanta desegnaĵojn de 52 popoloj el ĉiuj kvin kontinentoj. La ekspozicio okazis dank' al fervora laboro de la konata latva pedagogo-esperantisto A. Kubulnieks.

Plezura estis la koncerto de blindaj esperantistoj el Riga; ĝin gvidis la poetino L. Jevsejeva.

Aperadis tendara murgazeto „Verda Stelo“.

La tendaro finiĝis per komuna koncerto-balo, kiu okazis en la kulturdomo de Smiltene.

La XIII Balta Esperanto-Tendaro estis organizita de la Esperanto-klubo de Riga. Precipe multon da energio kaj sinferemo dediĉis Mirdza Burgmeister, Elvira Lippe, Amalia Gruike kaj S. Neilande.

J. Baliene

EPIZODOJ EL LA 5-A

La ĉi-jara 5-a konferenco de Soveta Esperantista Junulara Movado (SEJM) komenciĝis la 19-an de julio sur la Dnipro insulo Hortnica, 600 km for de Kievo.

La kunsidojn gvidis A. Gonĉarov (Barnaul)—unua prezidanto de SEJM. Post mallonga enkonduka parolado de V. Ŝilas, lastatempa SEJM-prezidanto, sekvis ĝeneralaj raportoj de klubaj reprezentantoj.

La sekretario de SEJM-konsilantaro A. Meĉdinš (Riga) komentis la raportojn, kiujn prezentis la kluboj. Eĉ nekompletaj ciferoj (ne ĉiuj kluboj raportis) estas interesaj:

vesperoj, ekskursoj, marŝoj — 159, E-aranĝoj kun ĉeesto de aliurbanoj — 54, kunvenoj kun antaŭplanita programo — 774, artikol(et)oj en gazetaro — 208, prelegoj por neesperantistoj — 171, publikaj E-ekspozicioj — 53, televidaj dissendoj — 18, ekspozicio de Lenin-

Montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa estas ŝatata ekskursloko por la esperantistoj. Vizitu ĝin ankaŭ vi!



gazetoj el 18 landoj, kino-revuo pri E-klubo (la lastaj du punktoj rilatas la klubon de Barnaul). Ĉiu aktiveco portis al la kluboj poentojn (laŭ speciala sistemo).

Fine la sekretario anoncis rezultojn de la socialisma konkurado inter la 43 kluboj. La transira Zamenhof-pokalo hejmos en Barnaul. Jen la unuaj kvin lokoj: 1. **Barnaul** — 1441 poentoj, 2. **Ufa** — 1419. 3. **Riga** — 1417, 4. **Vilnius** — 1110, 5. **Klaipeda** — 1072.

La konversacion pri propagando de Esperanto komencis B. Kolker (Ufa): „... nia tasko estas esperantigi kiel eble plej multajn urbojn. Tion ni faras per niaj „ambasadoroj“ — personoj, kiuj, fininte la studojn, forveturas al diversaj lokoj. . .“

V. Zibenkes el Maĥaĉkala: „... en nia universitato funkcias Esperanto-katedro. A. Junusov preparis kurslaboron „Lenin en la E-literaturo“.

B. Tokarev (Moskvo): „... esperantistoj devas partopreni en ĉiuj formoj de socia agado. La dagestana labortendaro ne estis plene esperantista, tamen ĝi utilis al la Movado. . .“

Ĉiutage ni kunsidis po ĉirkaŭ 6 horoj, dum la paŭzoj refreŝigadis nin la rivero Dnipro. Vespere sonis kantoj — malnovaj kaj novaj (la kanta fako de SEJM ekipis ĉiujn per kantaretoj).

Multaj demandoj estis diskutataj. Oni akceptis rezolucion el 30 punktoj. Fine la konsilantaro diris: „For la malnova komitato, vivu la novaj gvidantoj!“ — kaj elektis. . . preskaŭ la samajn. Bonvolu konatiĝi: prezidanto — B. Kolker (Ufa), sekretario — A. Medinŝ (Riga), vicprezidantoj: pri superaj instancoj — V. Aroloviĉ (Moskvo), pri eksterlando — L. Kazancev (Ivanovo), pri propagando — M. Bronŝtejn (Tula), pri fakoj — B. Anohin (Ust-Kamenogorsk), pri financoj — A. Vizgirdas (Klaipeda), pri lernejoj — V. Ŝilas (Vilnius).

Poste okazis perŝipa veturo al Kiev (600 km) — dum du tagnoktoj surŝipe oni diskutis pri „SEJM morgaŭ kaj postmorgaŭ“, la komitataroj finprecizigis siajn devojn. Finiĝis la laboro, ni admiris preterantajn vidindaĵojn. La ŝipa radiocentro anoncis (en Esperanto, kompreneble): „Kamaradoj, ne dormu! Sur dua ferdeko okazos dancoj!“ Kial ne? Ankaŭ mi iros. . .

V. Ŝilas

ĈE VASTA DNIPRO

La tagoj apud Kiev ekde la 29 de julio ĝis la 6 de aŭgusto pasis tre rapide kaj riĉenhave. Tie okazis SEJT-13 (Somera Esperanta Junulara Tendaro). Nia familio estis tre granda — 320 partoprenantoj, inter ili 30 eksterlandanoj. Ĉe Dnipro etendiĝis horizontoj de amikeco. Venis amikoj el batalanta Vjetnamio (3), el frataj Bulgario (3), Pollando (9), Hungario (15) kaj el preskaŭ ĉiuj grandegaj urboj de Sovetunio.

Dum la malfermo salutis la Tendaron Aleksandr Vorobjov — en la nomo de la Centra Komitato de l'Ukrainia Junkomunista Unio, Sergej Skorobogatjko — sekretario de la Komitato de l' Junkomunista Unio en Kieva Politeknika Instituto. Ankaŭ la gastoj el Hungario Istvan Eöry, el Pollando Roman Rutkovski, el Bulgario Nikola Uzunov, el Vjetnamio Ĉan Kuan Ngok.

La tendara programo proponis multe da diversaj aranĝoj. Plej menciindaj estas: pedagogia seminario, scienca seminario, kursoj por komencantoj, daŭriga kurso, Neptuna festo, klubo de gajuloj kaj sprituloj.

La prelegoj dum la pedagogia seminario temis pri gramatiko de Esperanto, interlingvistiko, historio de E-movado, E-literaturo, metaj diko de E-instruado. Prelegis altkvalifikitn-specialistoj: docento B. Kolker el Ufa, docevo B. Tokarev el Moskvo, aspiranto K. Velk — el Sofio. Post la prelegoj sekvis ekzameno 30 personoj ricevis atestojn pri instrurajto. j:

Riĉaj per sia enhavo estis la vesperfestoj tiu de centra Rusio, Siberio, Ukrainio, Baltislandoj. Ufanoj kune kun barnaulanoj preparel eĉ Esperanto-„operon“. Ĉan Kuan Ngok a Vjetnamio, partopreninto de bataloj kontraŭ l' usona agreso, prezentis kanton de partizano-„Ĉangalo“. Tiu ĉi kanto ĉiam sonis dum la tendaro, esprimante la solidarecon kun la suferanta popolo de Vjetnamio. Litovoj dum la tendaro prezentis interesan programon. Sonis en Esperanto plej novaj estradaj kantoj de litovaj komponistoj.

Ĉe vasta Dnipro estiĝis vasta amika rondo. Ĝis revido, kara amikar', en Siberio, en SEJT-14!

Laŭ A. Kajénaitė

RENKONTIĜO INTER POLAJ KAJ SOVETAJ ESPERANTISTOJ

Dum tri tagoj fine de oktobro 1971 polaj esparantistoj gastis al Esperanto-Klubo „Juneco“ en Vilnius. En la Domo de l'Instruistoj okazis amika renkontiĝo.

Sur la tabloj brilis kandeloj. Ĉiuj kantis interkonan kanteton. Vitas Ŝilas, nia prezidanto, rakontis al la gastoj pri la 10-jara agado de la klubo.

Ni konatigis al niaj gastoj litovajn popolkantojn. Plej varmajn aplaŭdojn ricevis Snegoj Raslanaite, studentino de Vilniusa Konservatorio, kiu kantis esperantlingve du popolajn litovajn kantojn.

Dancoj, ŝercoj, ludoj, bonega humoro. Rememoroj — neforgeseblaj!

Stanislava Sobanska

DUDEKJARA DATREVENO DE CED

La 1-an de januaro kompletigis precize 20 jaroj ekde la fondiĝo de CED. Por bone kompreni la gravecon de tiu evento, necesas rememori, ke antaŭ la fondiĝo de CED ekzistis nenia institucio, kiu sisteme okupiĝus pri esplorado kaj dokumentado de diversaj aspektoj de la lingva problemo en la nuntempa mondo. La fondiĝo de CED kaj ĝia 20-jara funkciado plenigis la vakvon. Per pli ol minimumaj financaj rimedoj, sed per multe da kompetenteco kaj sindono de siaj kunlaborantoj CED sukcesis atingi konsiderindajn rezultojn sur la kampo de sciencaj esploroj kaj dokumentado.

En 20 jaroj en CED estis katalogitaj pli ol 4000 apartaj dokumentoj rilatantaj al la lingva problemo en la mondo kaj al la rolo de Esperanto, kaj ĉirkaŭ 5000 eroj el diversaj fakaj periodaĵoj kaj gazetoj. CED eldonis ĉirkaŭ 400 diversajn dokumentojn en la Internacia kaj angla lingvoj, plurajn el ili ankaŭ en aliaj naciaj lingvoj. Memorandoj aŭ dokumentoj estis publikigitaj en diversaj okazoj, interalie en ligo kun la transdono de la Propono por la solvo de la lingva problemo al la Sekretario de UN en New York, en 1966. En 1954 CED publikigis la verkon „La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto“. La unua eldono jam de longe elĉerpigis, kaj nun estas preskaŭ finpreta la manuskripto, komplete reviziita kaj ĝisdatigita, de la dua eldono. En 1960 aperis „Memorlibro pri la Zamenhof-jaro“, en kiu troviĝas pluraj elstaraj artikoloj, kiuj, pro sia daŭra valoro, estas efike utiligeblaj ankaŭ hodiaŭ. Aparte menciinda estas la publikigado de la periodaĵo „La monda lingvo-problemo“, kies unua numero aperis en 1969, kaj kiu enhavas unuarangajn kontribuojn, ofte de mondkonataj fakuloj, kaj aliajn tre valorajn materialojn. En

* CED — Centro de Esplorado kaj Dokumentado (pri la monda lingva problemo)

1970 aperis la libro de mag. I. Dratwer „Pri internacia lingvo dum jarcentoj“.

La rektaj rezultoj de la agado de CED estas sufiĉe facile konstateblaj. En la fono de ĉiuj grandaj mondskalaj agadoj de la lastaj 20 jaroj — ekde Unesko 1952 ĝis la Forumo en Londono en 1971 — ĉiam troviĝis CED, ĝiaj dokumentoj, memorandoj kaj publikaĵoj. La moderna Esperanto-movado ne estas imagebla sen CED. La flankaj, nerektaj efikoj estas tiel multnombraj, ke apenaŭ eblus listigi ilin.

CED ne celebras la datrevenon, sed plu laboras kaj laboras por firmigi la pozicion de la Internacia Lingvo per objektivaj faktoj, dokumentoj kaj science bazitaj argumentoj.

El „Esperanto“ n-ro 1/1972

NOVA PRINCIPA VENKO EN UNESKO

Rezulte de multaj klopodoj la lasta Konferenco de NROj*, okazinta fine de oktobro en Parizo, amendis la internan regularon kaj unuanime akceptis la starpunkton de UEA. Laŭ la amendita art. XI/4 la Konferenco de NROj uzos la francan kaj anglan, sed la delegitoj rajtos uzi „aliajn lingvojn“, en kiu kazo ili devas prizorgi sian propran interpretiston. Nenio, do, plu malhelpas, ke en unu el la sekvantaj Konferencoj oni oficiale aŭdu la Internacian Lingvon.

El „Esperanto“ n-ro 1/1972

*NROj — neregistritaj organizaĵoj pri la Homaj Rajtoj.

SEMED 71 — IMPONA SEMINARIO EN LA MEDITERANEA REGIONO

En la monato julio okazis sur insulo Samos en Grekujo la unua tiel nomata SEMED (seminario mediteranea pri lingvaj problemoj kaj eventuala kunlaborado); partoprenis ĝin ĉirkaŭ kvindek junaj esperantistoj, el kiuj dudek estis eksterlandaj geamikoj el Francio, Italio kaj Jugoslavio. Po unu reprezentanto de la kvar landoj informis pri la lingvaj problemoj de sia lando kaj la instruado de fremdaj lingvoj en kaj ekster la lernejoj; krome diskutiĝis la eventuala posta kunlaborado.

Estis akceptita rezolucio akcentanta la sekvojn de la lingva diverseco, i. a. malfaciligon de junularaj interrilatoj kaj esprimanta deziron estonte eble ĉiujare okazigi samspecan seminarion en la mediteranea regiono.

Ne nur la loka kaj Atena gazetaro, sed ankaŭ greka televido menciis la SEMED'n per favoraj vortoj. Konsiderante, ke tio estis la unua internacia Esperanta aranĝo en Grekujo, SEMED'71 ne nur estis sukcesa, sed eĉ sukcesega.

E-renkontiĝo de bulgaraj junpioniroj esperantistoj el u. Vraca kun junpioniroj en u. Krajoŭa (kursgvidanto Petre Fetojn, str. Balzak 9 — Krajoŭa 5).



KIU INVENTIS ESPERANTON?

Antaŭ monato vizitis montodomon „Esperanto“ sur Vitoŝa mezaĝa turisto. Li legis la tekston de la marmora tabulo, fiksita sur ĝia fasado, kiu klarigas, ke la montodomo estas konstruita okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof — aŭtoro de Esperanto. Poste subite la turisto diris al mi, ke li havas amikon, kiu loĝas sur strato „D-ro Ludoviko Zamenhof“ en Sofio. Kaj daŭrigis: „Ĉu la aŭtoro de Esperanto — Lazaro Zamenhof — kaj tiu d-ro Ludoviko Zamenhof estas parencoj?“

Mi estis surprizita, eĉ ŝokita de tiu sensenca demando. Kompreneble, mi klarigis al la demandinto, ke Lazaro Zamenhof kaj Ludoviko Zamenhof estas unu sama persono. Mia aserto, ke Zamenhof havis du proprajn nomojn, kiuj egale estas uzataj, ne estis tre konvinka por civitano de lando, en kiu homoj havas nur unu personan propran nomon.

Cerbumante pri la afero, en mia memoro aperis dekoj da ekzemploj pri malsama aperigo de la propra nomo de Zamenhof. Ĉe vizito de la tombo de nia Majstro en Varsovio mi legis sur la tomboŝtono d-ro Lazaro Zamenhof kaj en libroj pri li kaj lia verko foje Ludoviko, kaj aliffoje Lazaro.

Ĉu ne estas bone kaj utile interkonsenti pri skribo nur de unu sama propra nomo de Zamenhof? Se tio okazus, nia propagando nur gajnos kaj miskomprenoj ne okazos. UEA povas kaj devas helpi tiurilate, ĉar ĝi en sia agado plej ofte mencias la propran nomon de d-ro Esperanto. La propono de kelkaj personoj, ke ni ĉiam skribu nur mallongigite d-ro L. L. Zamenhof ne estas solvo de la problemo.

Nik. Nikolov

KONCIZE

● En Brazilo deputito Athié Jorge Coury lastatempe faris en la federacia parlamento paroladon „Esperanto en la lernejoj“.

● En urbo Kuopio (Finnlando) kun proksimume 65 000 loĝantoj la Esperanto-Klubo „Lingvoponto“ lastatempe disdonis al ĉiuj hejmoj 23 000 ekzemplerojn de grandformata gazetsimila broŝuro pri Esperanto.

● Por la Vintra Olimpiado, okazinta en februaro 1972 en la urbo Sapor, Japanio, anoncis sin i. a. 10 esperantistoj por la funkcio de „bonvolaj interpretistoj“. Ili portis la oficialan insignon kun la vorto „Esperanto“.

Ĉefredaktoro: Kunĉo VÂLEV

Redakta komitato: Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Tatjana EVSTRATIEVA, Venelin MITEV, Stefka HRISTOVA, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

POR LA MALGRANDA ESPERANTISTO

Ljudmila Jevsejeva

ERINACO

Hej, kienas vi sen laco,
kamarado Erinaco?

Kion celas vi rezulte?

Portas mi da pingloj multe
al sciuroj — tri fratinoj,
diplomitaj tajlorinoj.

Dum minutoj kvin: trik-trak! —
estas preta via frak'.

MALKONTENTA KATO

Se ekmastras hejme rato —
invitata estas kato.

Se troviĝas hejme lakto —
oni min forpelas. Fakto!

Homoj agas nenormale!

Ĉu ne devus esti male?

Distroĵ

HUMORAĴOJ

— Mi aŭdis, ke viaj najbaroj vivas kiel paro da kolomboj.

— Jes, iufoje unu elflugas tra fenestro, la alia — tra la pordo.

*

— Ĉu vi ne scias, — demandas korespondanto virinon, — kiu okupiĝas pri kontraŭreglia laboro?

— Dio, scias! — respondas ŝi.

Elukrainigis: D. Cibulevskij

NOVAJ PROVERBOJ

Troa rapido kondukas al rido.

Belega promeso kun tuja forgeso.

Ne vekigis intereso pro neceso.

Por saĝul' eĉ duonvorto klaras kiel tutraporto.

Povas esti elokventa eĉ respondo tutsilenta.

Sabotas kolero en ĉiu apero.

Romano Grinŝpan, USSR

● En Luksemburgo — lando kun 2600 km² da areo kaj proksimume 80 000 loĝantoj — naskiĝis unuafoje landa organizaĵo Luksemburga E-Asocio.

● Registra konsilisto s-ro Ernst Werner, la sekretario de Aŭstria Esperanto-Instituto, ricevis de d-ro Franz Jonas — la federacia prezidanto de Aŭstrio — la diplomon „profesoro“ pro sia eminenta aktivado por Esperanto.

El „Esperanto“ n-ro 1/1972

DEZIRAS KORESPONDI

Hungario

M. Jozefo Poor — str. Szürcsapo 26/D, *Szombathely* (junpioniro - kun knabino, kolektanta pm).

Stefano Bögyös — Pf. 0839/H, *Pécs* (21-jara — kun bulgara junulino — pri sporto, muziko, literaturo).

Stefano Gelenczer — Ker tész u. 11, *Kaposvár*, (24-jara — kun bulgaraj knabinoj — pri lingvoj, pm).

Pollando

30 geknaboj inter 11—15 jaraj deziras korespondi kun samaĝuloj el ĉiuj landoj. Skribu al ilia instruistino: Maria Wilczynska, ul. Obotrycka 22/3, *Szczecin* 33.

Jozefo Stryorek — Nyska 33/10, *Wrocław* (24-jara, elektristo, — kun ĉi pri literaturo, muziko, kino, teatro kaj tekniko).

Halina Paczkawska — u. Skolna 4/8, *Radziejów* woj. Bydgoszcz (22-jara — kun bulgaroj pri arkitekturo, muziko, turismo).

Krystyna Kuzlik — ul. Bronislawa Czecha 3, *Zakopane* (22-jara — kun gebulgaroj pri turismo, pm, bk, gramofondiskoj).

G. Kaczynska — str. Roosevelta 16, *Pietrków* woj. Łódź (22-jara, flegistino — kun ĉi pri turismo, popola arto, kanzonoj kaj literaturo).

Barbara Rybczynska — ul. Buywida 7 m. 8, *Wrocław* (22-jara — kun ĉi pri literaturo kaj moderna muziko).

Ludwik Szymanski — ul. Zawadzkiego 24/41, *Tarnobrzeg*, woj. Vzeszonskie (24-jara kemiisto — kun ĉi pri sciencaj libroj, fotografio, filmoj, astronaŭtiko, bk, pm, ŝatas vojaĝi).

Krystyna Zywiecka — str. Norweska 29, *Wrocław* 25 (16-jara — kun ĉi pri literaturo, kino, teatro, moderna muziko, pm, bk, diapozitivoj).

Rumanio

D-ro Pop Aleksandr — bulv. Pacii 100, blok 19, apt. 92, *Bukureŝto* Sekt. 7 (bestkuracisto — pri abelbredado kaj muziko, interesiĝas E-kantojn).

Sovetunio

Anatolij Iranko — abonkesto 464, *Krasnodar* — 27 (23-jara, elektristo — kun ĉi pri ĉt, kolektas bk, librojn, gramofondiskojn).

Antanas Visockas — 232 000 *Vilnius*, Litovio (18-jara studento — kun ĉi pri estrada muziko, arto, kino).

Jurij Golovlion — Tajkos prosp. 87—8, *Klaipeda* 11, Litovio (pri filatelo, pm, bk.).

Ireno Veksler — str. Frunze 11, dom 36 310 *Harkov* (lernantino en oka klaso — pri muziko, literaturo, kino, pm).

Elvira Stanislauskaitė — Kedainius — 235031. *Medekšiai*, Litovio (22-jara fraŭlino — kun gebulgaroj — kolektas bk, pm. gramofondiskojn, fotojn de artistoj).

Sigita Urbonaitė — *Moletai*, vidurine mokykla, IX — klaso (16-jara lernantino — kun ĉi pri ĉt, bk).

Irina Andreeva — str. Kalinina 73—27, *Ufa*, 450 032 Baŝkirkaja SSR (kun lernanto en 8 klaso).

Jan Prizerovskij — *Ĉernigov*, gl. poĉtamt, do vostrebovanija (21-jara studento en jura teknikum — pri studenta vivo, juro, sporto (lukto), E-literaturo, insignoj k. a.).

Norden Rajus — *Viljandi*, (s) str. Kõrgemäe 7—2, Estonio (40-jara rentgenlaboratoria laboranto — pri foto kaj filmaktoroj el ĉi).

Maidesoo Leili — str. Lohu 25, *Viljandi*, Estonio (33-jara medicina fratino — kun medic. laboristoj).

Kõiv Tiit — *Halliste-Kulla*, Estonio (25-jara akuŝistino — kun medic. laboristoj k. a.).

Korts Eda — Jämejala haigla, *Viljandi* raj., Estonio (34-jara biologia biokemiisto — kun samfakuloj k. a.).

Rohula Asta — Kingiseppa str. 61—2, *Viljandi*, Estonio (46-jara dieta med. fratino — pri ĉt kun ĉi).

Leonid Varešin — 6 Koljanovskaja 12—16, *Ivanovo* 153 040 (27-jara kuracisto — kun ĉi pri medicinaj kaj sociaj problemoj, moroj, bk, pm).

Multaj geesperantistoj (18—25-jaroj) dez. kor. kun ĉi pri ĉt. Respondo certa. Skribu al Esperanto-klubo, p. k. 18, *Ivanovo*-centro 153 000.

Pres-fako de Sovetunia Esperantista Junulara Movado (SEJM) serĉas kunlaborantojn el ĉiuj landoj. Ĉiuj kontribuantoj estos premiataj. Pri la kondiĉoj kaj detaloj skribu al: V. Ivanov, p. k. 18, *Ivanovo*-centro, 153 000.

Junpionira Esperanto-rondeto „Fajrero“ dez. korespondi kun bulgaraj junpioniroj-esperantistoj. Skribu al ilia gvidanto: Paulo Bojko — str. Volodarskogo 22, kv. 87, *Pavlodar* 10 323010, Pavlodarskaja obl., Ukrainio.

NELPU INTERESAN E-INICIATION!

Barnaula Esperanto-Klubo aranĝos je la fino de 1972 grandan fotoekspozicion sub titolo „Monumentoj de rusaj kaj sovetaĵoj homoj eksterlande“. La esperantistoj el la tuta mondo estas petataj helpi tiun bonan peresperantan iniciaton. Bonvolu ankaŭ ĝuste traduki la monumentan surskribon kaj klarigi kiam kaj kial la monumento estas starigita. La plej bonaj fotoj kaj akompana teksto estos premiitaj de la organiza komitato. Ĉion sendu al: **Romanov V., Esperanto-Klubo, p. k. 40, Barnaul-99, Siberio, Sovetunio.**